



# Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 6  
1974

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
Redaktoro: Hans Amund Rosbach

3-a periodo  
41-a (50-a) jaro  
Dumonata

## NORVEGA ESPERANTISTO dum 50 jaroj

Per ĉi tiu numero finiĝas la 50a jarkolekto de *Norvega Esperantisto*. Tio eble ne estas granda jubileo; sed nur malmultaj Esperanto-revuoj povas rerigardi al tiom longa vivo.

Tamen ne temas pri seninterrompa aperado dum 50 sinsekvaj jaroj. La unua jaro de nia revuo estis 1909, poste ĝi havis tri paŭzojn: 1915—21, kiam la sveda «La Espero» estis samtempe organo ankaŭ de N.E.L., 1925—1931, kiam la Esperanto-movado en Norvegujo relative profunde dormis, kaj 1943—44, kiam la naziaj aŭtoritatoj rifuzis al ni paperon; sed oni tiam eldonis stencilitan anstataŭaĵon «Meldinger fra Norsk Esperanto-Forbund», kaj se oni kalkulas ankaŭ tiujn jarojn, efektive ni estas nun en la 52a jaro. — Pli detalan historian superrigardon pri nia revuo oni trovas en n.ro 3/1973.

Kion do signifis dum tiuj 50 jaroj, kaj plu signifas *Norvega Esperantisto* por la esperantistoj en nia lando? Pro

sia geografia formo nia lando havas grandegajn distancojn. La esperantistoj loĝas tre dise, la kontakto inter la membraro kaj la gvidantaro devas okazi plejparte skribe, sed skribado de leteroj postulas energion! Grandparte ĝuste la revuo estas la kontaktilo. Per ĝi la gvidantoj parolas al la membroj, kaj la membroj povas komunikiĝi inter si kaj kun la gvidantoj (kion ili bedaŭrinde faras en multe tro malalta grado!). El diversaj lokoj oni raportas, ke la membroj streĉe atendas la alvenon de la revuo.

Ŝajnas, ke la plej populara rubriko estas la «Norvega Kroniko», per kiu la lokaj kluboj «parolas inter si». Oni legas kion faras la kluboj, kaj tio donas ideojn kaj impulsojn al aliaj kluboj. Ŝatata rubriko estas evidente ankaŭ la «Fervojista Paĝo». Grava estas la rubriko «Recenzoj», kiu raportas pri la novaĵoj de la Esperanto-literaturo. Eĉ literaturaj pecetoj po-  
(daŭr. p. 84)

## Sciigoj de N.E.L.

**Kotizoj por 1975.** Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas sian kotizon frue. Kubanoj bonvolu pagi al la klubo kasisto, rektaj membroj al N.E.L.

**U.E.A.-kotizoj 1975.** Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto ESPERANTO ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1975. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118a, Oslo 6, poŝtĝirokonto 1.33.29. — La nova estraro de U.E.A. transprenis la asocion en terura ekonomia stato kaj faras ĉion por resanigi ĝin. Kun bedaŭro oni devis i. a. ankaŭ iom plialtigi la kotizojn, kaj oni petas pri komprenemo kaj fideleco flanke de la membroj, admonante ankaŭ al ĉiuj aliaj esperantistoj fariĝi Individuaj Membroj. La kotizoj por 1975 estas: Membro kun Jarlibro kr. 50,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton ESPERANTO) kr. 100,00.

**Kursoj.** Urgas jam plani la kursojn de la venonta printempa sezono. Precipe la kluboj, kiuj ne aranĝis kursojn dum la nun pasinta aŭtuno, nepre klopodu aranĝi kursojn por komencantoj dum la printempo. Sen kursoj neniu progreso! Ankaŭ rektaj membroj povas sukcese aranĝi kursojn.

**Korespondaj kursoj.** Se ne okazos aliaj kursoj en via loko, varbu por la korespondaj kursoj! Elementa parto kr. 100,00, perfektiga parto kr. 100,00. Por ano de studrondo de minimume 5 membroj po kr. 48,00.

**Gazeta kurso.** Klopodu igi gazeton en via loko aperigi nian gazetan kurson. Ĝi estas havebla ankaŭ por gazetoj ofsete presataj. Petu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono.

**Prelegoj.** Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L.; blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

**Taskotabelo por kluboj.** — **Decembro:** La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi sian kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaĵoj libroj al la Eldonejo.

(daŭr. p. 84)

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

**Provizora redaktoro:**

Hans Amund Rosbach  
Johan Hammond Rosbach

**Adreso de la redakcio:**

Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N  
(Limdato por manuskriptoj: la 20.  
en la monato antaŭ la apero.)

**Abonprezo:** En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

**Anonprezoj:** 1/1 p. kr. 150, 1/2 p. kr. 75,  
1/4 p. kr. 40, 1/8 p. kr. 20.

### Iomete pri mi — kaj pri vi

Via provizora redaktoro havas peton. Kaj antaŭ ol fari la peton, mi deziras iomete klarigi la situacion al vi. Kiel vi jam scias, mi estas jam 50-jara (Koran dankon pro la gratuloj!), do ne plu juna. Kaj kiel vi ankaŭ scias, mi estas pastro. Sed multon vi certe ne scias: Jen:

En mia urbo devus esti 4 pastroj. Estas du. El tio nature venas la konkludo: Ni ambaŭ devas fari duoblan laboron. Tiel mi havas ĉiusemajne 6 instruhorojn en la gimnazio, 6 vizitojn al institucio (malsanulejo ktp), ĝis 8 ordinaraj kunvenoj, almenaŭ unu oficialan kunvenon (infangarda komisiono, socilabora estraro, paroĥa konsilantaro ktp), meznombro 1 entombigon kaj 1 geedzigon, ĝis 4 diservoj, almenaŭ 12 vizitojn al malsanuloj, maljunuloj, funebrantoj ktp.

Aldone venas la poresperanta laboro. Dum 10 jaroj mi redaktas La

Skolian Mondon. Dum eĉ pli longa tempo mi ĝuas literaturan laboron. Mi korespondas kun deko da personoj. — La laborotempo do regule estas ĉiutage — la dimanĉoj ne estas esceptoj — de la frua mateno ĝis malfrua vespero, en ordinaraj labortagoj de la oka matene ĝis la dudektria vespere. Jen mia situacio.

Tial mi havas peton. Kaj tio temas pri vi: Se vi ne havas tute saman laboramason, vi eble povas transpreni la redaktadon de Norvega Esperantisto? Tio estas tre serioza demando: Mi provizore transprenis la laboron por savi la gazeton, sed vi mem povas kompreni, ke tio ne povas esti daŭra stato. Do: Kiu sin proponas?

Hans Amund Rosbach

### La kontorfondado

Pli frue .....	kr. 1242,20
R. Bugge-Paulsen .....	» 60,00
Signe Korstvedt .....	» 20,00
C.S.B. ....	» 20,00
La estraro .....	» 24,00

kr. 1366,20

### Kampanjo Reisæter

Pli frue .....	kr. 1900,00
Annemor Jæger Bye ....	» 300,00
R. Bugge-Paulsen .....	» 100,00
Okcidenta Distrikto .....	» 300,00
Erling Vorland .....	» 100,00

kr. 2700,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

## Sciigoj de N.E.L. (daŭrigo)

*Januaro:* La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilanon. La revizoroj kontrolas, ke la kasisto faras tion kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj ĝenerale la printempan agadon, pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilanon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba alvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono.* Okazis unu estrarkunveno kaj oni elsendis unu cirkuleron. C. Støp-Bowitz reprezentis N.E.L.n ĉe la Universala Kongreso en Hamburgo, la norvegan registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen. La Instruista Sekcio proponis al «Statens Lærarkurs» aranĝi kurson de Esperanto por instruistoj somere 1975. Programo kaj vojaĝplano por la 44a Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø estas aprobitaj. Oni esploras la eblecojn por prelegvojaĝoj de kelkaj eminentaj prelegantoj dum la proksima tempo.

*La Liga Estraro.*

## Norvega Esperantisto (daŭr.)

vas de tempo al tempo trovi lokon en niaj paĝoj. Gravaj estas fine kompreneble ankaŭ la oficialaj informoj. Sed gravas pli ol ĉio la fakto, ke per la revuo la esperantistoj pli-malpli regule ricevadas iom da legaĵo en nia lingvo. Lastatempe oni multe diskutis pri la valoro de la landaj Esperantorevuo, laste dum la kongreso en Hamburgo. Pro la altaj preskostoj oni parolas pri ĉesigo aŭ unuigo de

revuoj. Sed verŝajne la landaj revuoj tamen ludas rolon malfacile anstataŭeblan. Gratulante al *Norvega Esperantisto* okaze de la jubileo mi deziras al ĝi prosperon kaj ankoraŭ longan vivon!

*C. Støp-Bowitz*

## POŝTMARKA DONACO

El Romanujo ni ricevis — de Ioan Bettisch — plurajn poŝtmarkojn, kiuj parte estis tuj forvendataj, je profito de nia gazeto. Koran dankon!

## JUBILEOJ

### «La kapitano» 80-jara

Unu el la plej unuaj nunvivantaj esperantistoj en Norvegujo, emerita infanteria kapitano, *Rolf Egil Bugge-Paulsen*, fariĝos 80-jara la 11an de decembro.

Li naskiĝis en Bergen en 1894 kaj esperantistiĝis jam en 1907, havante nur 13 jarojn. Dum sia 67-jara esperantisteco li faris trege meritoplenan agadon por Esperanto en Norvegujo. Ĉi tie ni povas mencii nur la ĉefajn trajtojn:

Bugge-Paulsen estis prezidanto de NEL 1919—34 kaj 1937—47, komitatano A de UEA 1922—62, ano de la Ekzamena Komisiono de NEL 1921—41, ano de la Lingva Komitato (nun la Akademio de Esperanto) ekde 1932. Li plue restariĝis Norvegan Esperantiston en 1922 kaj estis ĝia redaktoro en 1922—24 kaj en 1932. Li ankaŭ estis komisiito de NEL pri radio kaj interŝtataj organizaĵoj. Krome li estas tiu norvego, kiu partoprenis plej multe da Universalaj Kongresoj, la plejmultaj el ili eĉ kiel reprezentanto de la Norvega Registaro.

Li faris sennombrajn paroladojn kaj kursojn, ne nur en Norvegujo, sed ankaŭ en Svedujo. Li ankaŭ gvidis la unuan Esperanto-kurson per radio en Norvegujo 1928—29, kaj en 1930 li faris la preparojn por la Esperantokurso de pastro Cseh ĉe la universitato en Oslo. En 1931 li ankaŭ fondigis Esperantoklubon inter la policistoj en Oslo. En 1956 li vizitis Strashburgon kiam la kultura komisiono de la Eŭropa Konsilantaro traktis

Esperanton, kaj li ankaŭ estis konsilanto de la Nordlanda Esperantokomitato ekde 1960.

Bugge-Paulsen verŝajne estas plej konata pro sia literatura produktado. Krom pluraj propagandiloj li verkis i. a. la radiovortaron norvegan-Esperantan-anglan (1925—29), la 2an kaj la 3an eldonojn de la norvega ŝlosilo (1934 kaj 1956) kaj la maŝlosilon (1972). Li ankaŭ verkis la norvegajn prilaboraĵojn de la lernolibro de Sepik-Malmgren (1935, 1938, 1947 kaj 1955). En la jaroj 1932—40 li ankaŭ redaktis konstantan Esperanto-rubrikon en la revuo «Radiobladet». Plue li tradukis esperanten la libron «La skulptaĵoj sur la Vigeland-ponto» (1951).

En 1951 NEL honorigis lin per la ordeno PRO MERITO, Komandoro de la 2a klaso. En 1965 li fariĝis Komandoro de la 1a klaso, kaj en 1971 li ricevis la plej dignan distingadon de NEL — la Grandan Krucon. Nur la s-roj Brochmann-Sletterød kaj Rian portis ĝin antaŭ li. En 1969 Bugge-Paulsen eĉ fariĝis Honora Membro de NEL.

Ni tutkore sendas niajn plej sincerajn kaj varmajn bondezirojn al la jubileulo!

*LKH*

## KORESPONDUI

5 germanaj knabinoj (11-jaraj) deziras korespondi (Esperante, angle aŭ germane) kun norvegaj geknaboj. Bonv. skribi al: S.ro G. Hotz, D-61 DARMSTADT, Eleonorenschule, Jul.-Reiber-Str. 1, Germanujo.

## John Berggreen 65-jara

La 25an de Oktobro la agema ĝenerala sekretario de N.E.L. atingis la 65-jaran jubileon. Li lernis Esperanton jam en 1931 en Sandefjord, kaj baldaŭ poste fariĝis komisiito de N.E.L. pri skoltaj.

Poste li venis al Oslo, kaj baldaŭ aktivis en Klubo Esperantista en Oslo, fariĝis ĝia sekretario, poste vicprezidanto, kaj en 1964 prezidanto. Kiam okazis la 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo en 1965, li estis prezidanto de la L.K.K., kaj de 1967 li estas la ĝenerala sekretario de N.E.L.

Sed Berggreen aktivis ankaŭ sur la internacia kampo, precipe en Skolta Esperanto-Ligo, kies prezidanto li nun estas, kaj tie li havas la gravegan taskon prepari la uzadon de Esperanto en la monda ĵamboreo okazonta en 1975 en Norvegujo.

Okaze de la jubileo ni sincere gratulas, dezirante al li sanon kaj forton por plua energia laborado por la internacia lingvo.

C.S.B.



## Herolv Olsen 50-jara

Instruisto Herolv Olsen, prezidanto de la Norda Lumo, Tromsø, fariĝis 50-jara la 1an de oktobro 1974.

Li naskiĝis en Tennskjer en Lensvik, kaj dum la junulaj jaroj estis fiŝisto, plenumis la bordŝipestran ekzamenon 1944. En 1950 li ekzameniĝis instruisto ĉe la seminario en Tromsø, kaj dum 7 jaroj estis instruisto en sia hejmloko. Poste li frekventis la In-

struistan Attlernejon, kaj venis al Tromsø en 1960.

Li estas aktiva organiza viro, kaj estas membro de BUL (Kamparista Junularo), kaj dum pluraj jaroj estas prezidanto de La Norda Lumo. Ankaŭ en la Instruista Fakorganizo li faris sian devon. Liaj lingvaj interesoj estas krom Esperanto la Neonorveg-an, kiun li uzas en prozo kaj poemoj, en loka gazetaro kaj en fakrevuoj. Tial li mem indikas en la registra verko «Norvegaj Instruistoj» kiel intereso: Esperanto, interpopola laboro, norvega kultura heredo, liriko.

En Tromsø li tre aktivis en la por-esperanta laboro, skribas en la loka gazetaro kaj faras kursojn. Nuntempe li fervore laboras en la preparoj de la venontjara landa kongreso en Tromsø.

Kune kun liaj klubanoj ni ĉiuj postfeste gratulas.

## Heroldo de Esperanto

Heroldo de Esperanto, la sendependa, plej granda kaj plej ofte aperanta Esperanto-gazeto, informas, ke pro la kreskantaj prezoj la abonprezo por 1975 estos kr. 56,00. Sed ĝis la fino de 1974 novaj abonantoj por 1975 estas akceptataj laŭ la ĝisnuna tarifo (kr. 51,00), kaj ili ricevos la lastajn numerojn de 1974 senpage.

Abonojn akceptas: Esperantoforlaget A/S, Boks 942, Oslo 1, poŝtĝiro: 1.00.31.

## La Sveda jarkongreso

okazos en Halmstad la 17an ĝis la 19an de Majo 1975.

## 44-a Norvega Esperanto-Kongreso

en TROMSØ, 4.—7. Julio 1975

### PROGRAMO :

#### Vendredon la 4an de Julio

- 15.00 La kongresejo malfermiĝas.
- 19.00-21.00 Interkonatiĝa vespero.
- 21.00-24.00 Rondveturo per aŭtobuso. Ekskurso per montlifto.

#### Sabaton la 5an de Julio

- 10.00 Malfermo de la Kongreso. Salutparolado.
- Unua laborokunsido de N.E.L.
- 13.30 Lunĉ-paŭzo.
- 14.30-17.30 Dua laborokunsido de NEL. Alia aranĝo por kongresanoj, kiuj ne partoprenos en la kunsido de NEL.
- 17.30-19.30 Kunsido de la Instruista Sekcio de N.E.L.
- 20.00 Festeno (bankedo)

#### Dimanĉon la 6an de Julio

- 10.00-18.00 Ekskurso al Lyngenfjord.
- 20.00 Internacia vespero.

#### Lundon la 7an de Julio

- 9.00-11.00 Tria laborokunsido de NEL.
- 11.00-11.30 Fermo de la kongreso.
- 12.00-17.00 Ekskurso per ŝipo aŭ aŭtobuso en la ĉirkaŭaĵo de Tromsø. Fiŝkaptado. Varma manĝo.
- 18.00 Ekiro de la ekskurso al Norda Kabo.
- 20.00 Fermo de la oficiala kongresejo.

Ni rezervas al ni la rajton ŝanĝi la programon.

### INFORMOJ

Ŝajnas, ke eksterlande la intereso pri la kongreso en Tromsø estas tre

granda. Ni jam ricevis multajn leterojn kun demandoj pri vojaĝmanieroj, prezoj, ekskursoj, hoteloj k.t.p. La Loka Kongresa Komitato bedaŭras, ke ne estis eble respondi tuj. Jen informoj, kiuj unuavice estas necesaj.

Lokojn en hotelo kaj sur ŝipo oni devas mendi proks. unu jaron antaŭe. Ni esperas, ke sufiĉe da ĉambroj kaj kajutoj (en ŝipo) estas rezervitaj. Ĉiuokaze plej bone estas sendi aliĝilon baldaŭ.

Ne estis eble havigi ĉiujn ĉambrojn en nur unu aŭ du hoteloj. Tial estas multaj alternativoj kaj prezoj. Bedaŭrinde la hoteloj estas relative multekostaj en la centro de la urbo. La prezoj ne inkluzivas matenmanĝon, por ke ili ne estu tro altaj. Manĝaĵo en hotelo estas multekosta, prefere manĝu en kafeterio.

### ALTERNATIVOJ POR TRANOKTADO

(Notu la deziratan kategorion (litteron) sur la aliĝilo).

- A Mem aranĝos pri loĝado en Tromsø.
- B Unulita ĉambro, prezo 60-80 n.kr.
- C Unulita ĉambro, prezo 80-110 n.kr.
- D Dulita ĉambro, prezo 90-140 n.kr.
- E Trilita ĉambro (2 litoj + sofo), prezo 130-150 n.kr.
- F Loĝo en kampejo, 10-15 n.kr.
- G Tranokto en lerneja klasĉambro (malmultekoste).

### EKSKURSOJ

- 1. Rondveturo per aŭtobuso. Veturo per montlifto. Pr. 3 horojn. Kr. 30.



2. Ekskurso al Lyngenfjord en natura regiono, per aŭtobuso. Pramŝipo trans Ullsfjord. Varma lunĉo en Oteren («Lyngskroa»). Unue al Lyngseidet. Returne tra Nordkjotsbotn, laŭ Balsfjord al Tromsø. — Tuttaga ekskurso, proks. 5 horojn. Prezo kr. 90.
3. Ekskurso per ŝipo/aŭtobuso en suda/okcidenta ĉirkaŭaĵo de Tromsø. Fiŝkaptado. Varma lunĉo. Proks. 5 horojn. Prezo kr. 60.
4. Rondvojaĝo per loka ŝipo en fjordoj aŭ insularo. (Ni ekzamenos la intereson. Detaloj/prezo sekvas).
5. Postkongresa ekskurso al Norda Kabo (Nordkapp). Per rapidŝipo («Hurtigrute»). De Tromsø 7/7 je la 18a; al Honningsvåg 8/7 je la
- 13a. Kajuto en la ŝipo. Tagmanĝo vespere 8/7 en Honningsvåg. Aŭtobuso Honningsvåg—Norda Kabo (noktomeze). Ni ne havos hotelon. Returne per rapidŝipo — de Honningsvåg 9/7 je la 5.45, al Tromsø 9/7 je la 23a. Prezo kr. 450 (2a klaso, t. e. turistklaso).
6. Postkongresa ekskurso Tromsø—Svalbardo (Spicbergo) per ekspressipo. De Tromsø 8/7 je la 6a, reveno al Tromsø 14/7 je la 10a. La ŝipo vizitos la Urs-insulon (Bjørnøya), Isfjord radio, Longyearbyen, Ny-Ålesund, la glacieron de la Arktika Maro. Bileto, kajuto, ĉiuj manĝoj kostas por unu persono: 1-a klaso kr. 2800 — 2-a klaso kr. 1800.

## ELDONEJO ESPERANTO informas.

La tekstoj de la prelegoj faritaj en la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo en Aŭgusto 1974 estas nun haveblaj. La temoj estas biologiaj (C. Støp-Bowitz, E. Balech) kaj ĥemiaj (Kawamura, Flint). Ankaŭ kelkaj el la kajoroj el 1972 estas daŭre haveblaj. Sed rapide, ĉar ĉi tiuj kajoroj rapide elĉerpiĝos!

## Ĥoj

Oni jam komprenas, ke la kongreso en Hamburgo estis ne paca kaj harmonia. Kaj ankoraŭ eĥas tra la movado pro la okazintaĵoj. Honora prezidanto Homes ekŝiĝis el siaj oficoj,

la Kopenhaga klubo KKK ne plu deziras esti membro de DEL kaj UEA. Espereble — je la bono de la tuta movado — oni trovos novan harmonian fundamenton por la laboro.

## Terminaro

Mi memorigas pri la Fervoja Terminaro «Norvega/Esperanta—Esperanta/Norvega» kiu kostas 5 norv. kr. kaj kiun vi povas mendi ĉe mi. Ankaŭ mi memorigas pri uzitaj poŝtmarkoj por «Norvega Esperantisto» kiujn vi povas sendi al mi. — Adreso: Kaldbakstuppen 22, Oslo 9. Deforadreso: Vogndriften, Lodalen, Oslo Ø.

O. KOLBrek

## Recenzoj

T. A. Høeg: Katalog over interlingvistisk litteratur i Universitetsbiblioteket i Oslo. (Katalogo pri interlingvistika literaturo en la Universitata Biblioteko en Oslo.) 1973. 88 s. 15 kr. + porto.

Dum la lastaj jaroj oni pli kaj pli diskutas la problemon pri internacia lingvo. La antaŭa negativa sinteno ŝanĝiĝis al sciema intereso, kaj estas ofte tiel, ke se oni komencas kompreni iun problemon, oni ekhavas la deziron studi ĝin pli funde. Kelkaj emas kompari la multajn lingvajn projektojn. Aliaj studas la lingvon kiel komunikilo. Ĉu la ĉiutaga lingvo-uzo diferencas de la skriba lingvo, kaj ĉu ekzistas dialektoj? Nuntempe oni ĉiam pli okupas sin pri ekzemple la Esperantomovado kiel sociologia fenomeno. Kiuj homoj lernis aŭ lernas Esperanton? Ĉu la organizaĵo estas dominata de preskaŭ religiaj fanatikuloj aŭ de ordinaraj prudentaj homoj? Kiel ofte virinoj havas la plej altajn postenojn? Finfine sciencistoj serĉas la respondon al jena demando: Ĉu ekzistas literaturo koncerne mian fakon?

Listo pri verkoj hodiaŭ aĉeteblaj estas publikigata en la Jarlibro de UEA. Malnova, sed tamen leginda literaturo troviĝas en bibliotekoj, sed ĝis nun oni ne sciis kiujn librojn bibliotekoj en nia lando posedas. Por helpi esperantistojn kaj aliajn personojn kiuj interesiĝas pri la supre menciitaj interlingvaj problemoj, la Studenta Esperanto-Societo lastjare

decidis eldoni Katalogon pri interlingva literaturo en la Universitata Biblioteko en Oslo. Studentsamskipnaden apogis la planon, kaj universitata bibliotekisto Tom Arbo Høeg prenis sur sin la taskon ellabori la katalogon.

Li rekomendis, ke oni ne nur listigu literaturon pri kaj en Esperanto, sed ankaŭ registru librojn kaj artikolojn pri aliaj internaciaj lingvoj aŭ lingvo-projektoj. Nature la katalogo devis enhavi ankaŭ referencojn al literaturo negativa kontraŭ la ideo pri tiel-nomata artefarita lingvo.

La bibliografio ne baziĝas nur sur la verkoj en la sistema katalogo de la biblioteko. La kompilinto trafolumis milojn da libroj en la magazenoj por lingva literaturo. La celo estis fari kompletan liston, sed en tia grandega kaj malnova biblioteko, kie la reguloj pri katalogado en la daŭro de la jardekoj ŝanĝis plurfoje, estas fakte neeble trovi ĉiujn librojn kaj broŝurojn. Tio validas bedaŭrinde eĉ por literaturo eldonita en Norvegujo.

La katalogo estas ordigita laŭ la klasifika sistemo de Dewey. Tiu ĉi skemo ne estas ĉiam kontentiga. Aliflanke ĝi estas trecege multe uzata en ĉiu parto de la mondo. Ĉie oni ekzemple scias, ke literaturo pri psikologio havas la numeron 150-159. Oni ankaŭ povas menciigi 172.4: laboro por paco, 340-349: juro, 362.4: blinduloj, 369.4: skolta movado, 401: internaciaj lingvoj ĝenerale, 499.9: la unuopaj internaciaj lingvoj, kiel Esperanto, 510-519: matematiko, 590-599: zoologio, 839.9: norv. beletra literaturo, 899.9: orig. beletra literaturo en Esperanto.

La personregistro ampleksas aŭtor-

ojn, tradukistojn kaj priparolitajn personojn. Oni sukcesis trovi la jaron de naskiĝo aŭ/kaj morto de multaj el tiuj ĉi personoj. Tiaj informoj estas tre utilaj por aliaj bibliotekoj.

La katalogo ankaŭ havas alfabetan indekson.

Estas nur nature, ke la Universitata Biblioteko mankas multegajn verkojn, sed inter la 667 registritaj verkoj oni trovas tre valorajn librojn. Kelkajn etajn broŝurojn oni povas uzi nur en la legĉambrego de la biblioteko. La plej multajn verkojn oni rajtas prunti hejmen. Ĉiuj havas la rajton prunti tiujn ĉi librojn. Se vi loĝas ekster Oslo, estas preferinde, ke vi mendas la libron pere de la biblioteko en via komunumo. Por faciligi la laboron de la bibliotekistoj la katalogo ankaŭ notas la katalogan signaturon de la koncerna verko. Tiun ĉi signaturon oni devus skribi sur la blankedo kiam oni mendas la libron. La biblioteko ne sendas librojn al personoj ekster Oslo. Nur la resendan afrankon la pruntinto devas pagi. Ek al pruntado!

Koran dankon al la Studenta Esperanta Societo, al Studentsamskipnaden kaj al la Universitata Biblioteko por tiu ĉi inspira katalogo.

Prestro

### Tre grava publikigaĵo en Esperanto

La grava (neesperantista) Eŭropa Kultura Centro en Genevo, kiu grupigas la Kampanjon por Eŭropecivaniŝma Edukado, la Eŭropan Asocion de Instruistoj (36 000 membroj) kaj la Eŭropan Tagon de Lernejoj, lasta-

tempe interesiĝis pri la utilo de Esperanto, kaj prove eldonis numerojn de sia publikigaĵo «Eŭropa Dokumentaro» ankaŭ en nia lingvo. La ĝenerala sekretario, s.ro Govaers, estas kontenta pri la unua provo, sed por daŭrigi la eldonadon de tiu grava periodaĵo ankaŭ en Esperanto, necesas minimume 500 abonantoj antaŭ la 1a de Januaro. Oni ankaŭ bonvenigas artikolojn pri eŭropaj temoj (ekonomio, sociaj problemoj, lingvaj demandoj, edukado k.t.p.). Se la esperantistoj, instruistoj kaj aliaj, montras kontentigan intereson, oni eldonos ankaŭ aliajn dokumentojn en nia lingvo. — Ni forte rekomendas al la esperantistoj fariĝi abonantoj de E.D. (kr. 24,- jare), per kio oni efike subtenas ankaŭ la laboron por Esperanto en la lernejoj.

ELDONEJO ESPERANTO A/S  
Boks 942, Oslo 1.  
Poŝtĝirokonto 100.31.

## Ĉu vi tradukas?

En la lasta numero ni prezentis dek frazojn por traduko. Ĉu vi povis? Vi eble trovis plurajn malfacile tradukeblajn vortojn aŭ esprimojn.

Ni rigardu la frazojn:

1. *Hvor mange trinn er det på foten til monumentet?*

Gramatikon oni prefere traktu en la nacia lingvo — eksterlandaj legantoj bonvolu ekskuzi!

Alle vet at i forbindelse med *kiom* (hvor mange) brukes preposisjonen *da*. Altså: *Kiom da ŝtupoj*. Videre er det kjent at ordet «det» i setningen som skal oversettes, er et såkalt fore-

løpig subjekt — noe som ikke finnes på esperanto. «Til» er en litt mangfoldig preposisjon, vanligvis heter den *al*, således når den betegner retning eller hensynsledd. Men her uttrykker den et eieforhold, og heter altså *de*. «Foten» til et monument — kan man bruke ordet *piedo*? Ja, man kan faktisk det: la *piedo* de monumento, la *piedo* de monto. Ellers kunne *fundamento* eller *bazo* være brukbare ord. Den største vanskeligheten i setningen er imidlertid preposisjonen «på», for det er hverken *sur* eller *ĉe*. Vanskeligheten unngås ved å oversette setningen på en annen måte, og her er et forslag:

*Kiom da ŝtupoj havas la piedo de la monumento?*

Saken er den at man ikke skal oversette ord for ord, men *gjengi setningens innhold på best mulig måte*. Samtidig sørger man selvsagt for at den oversatte setning er så lik originalsetningen som mulig. Dette bør være retningslinje for all oversettelse.

2. *Hva slags trær er det som vokser i parken?*

Esperanto har et eget ord som betyr «hva slags», nemlig *kia*, som har flertallsendelse når det trengs, altså: *Kiaj arboj*. Men den norske uttryksmåten med «er det som» passer ikke i strukturen i esperanto. «A vokse» har to betydninger, nemlig 1) «å bli større» og 2) om trær og planter: «gro, befinne seg (her eller der)». Begge heter på esperanto *kreski*, så her er det intet problem. Setningen blir altså:

*Kiaj arboj kreskas en la parko?*

3. *Min onkel har solgt to hundre grisunger.*

Vi bryr oss på esperanto ikke så meget om forskjellen mellom imperfektum og perfektum, for den går i regelen fram av sammenhengen. Derfor kan man oftest oversette «har solgt» med *vendis*, og *estas vendinta* er overflødig komplisert. *Cent* er et ubøyelig tallord. Merk forskjellen mellom *porketo* (liten gris, smågris) og *porkido* (grisunge). Altså:

*Mia onklo vendis ducent porkidojn.*

4. *Banantreet har de største blad som finnes.*

Frukttrær kan uttrykkes med endelsen -uj, altså *bananujo*. Personlig foretrekker jeg *bananarbo*. «Blad» er *folio*, både på et tre og i en bok, mens et ukeblad er *revuo*. «Finnes» kan være passiv til «å finne», altså betydning «bli funnet». Den betydningen passer ikke her. Vi foreslår:

*La bananarbo havas la plej grandajn foliojn, kiu ekzistas.*

5. *En smal vei slynger seg gjennom vinmarkene.*

*Mallarĝa vojo* er vel bedre enn *vojeto*, hvis man da ikke mener «en sti». «Slynger seg»: f.eks. *kurbiĝas* eller *serpentumas* eller *meandras*. — «Vinmarker» er ikke marker hvor det vokser ferdig vin, derimot vinranker, som heter *vitoj* eller druer som heter *vinberoj*. — Forslag til oversettelse:

*Mallarĝa vojo serpentumas tra la vinberejo* (eller: *vinbergardeno*, *vinberkampoj*, *vitejo*).

De neste fem setningene tar vi neste gang. Prøv selv å oversette dem!

AK. III.

Ni prezentas:

## Internacia Scienca Asocio Esperantista

Aliĝinta faka asocio de U.E.A.

Prezidanto: *Prof. B. Popovič*, Beograd, Jugoslavio.

Vicprezidantoj: *D.ro C. Støp-Bowitz*, Oslo, Norvegujo.

*Inĝ. V. Peevski*, Sofia, Bulgarujo.

Generala sekretario: *D.ro J. Kavka*, Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Sekretario-kasisto: *Prof. M. Šaponjič*, Beograd, Jugoslavio.

Estraranoj: *D.ro G. Kalckhoff*, Germanujo; *prof. S. Kawamura*, Japanujo,  
*prof. P. E. Kustaanheimo*, Finnlando; *d.ro W. A. Verlooren van Themaat*, Nederlando.

Jam de 1903 aperadis en Parizo Scienca Revuo, sub redakto de Paul Fruictier. Dum la 2a Universala Kongreso en Genevo, 1906, kunvenis kelkaj sciencistoj komencante kunlaboradon por penetrigi Esperanton en la sciencistajn rondojn, kaj en 1908 fondiĝis Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.), sub prezido de generalo Sébert; ĝia oficiala organo fariĝis la Scienca Revuo. Tiu asocio rapide ricevis kuraĝigojn de multaj sciencistoj en ĉiuj landoj. En ĝia organo (kiu 1912-1914 nomiĝis Scienca Gazeto) aperis artikoloj pri la plej diversaj sciencaj kaj teknikaj temoj, kaj oni starigis terminaran komisionon, kiu kunordigis la ellaboradon kaj eldonadon de diversaj sciencaj kaj teknikaj terminaroj.

Dum la intermilita periodo I.S.A.E. ĝuis la favoron de la Franca Akademio de Sciencoj kaj daŭrigis la eldonadon de terminaroj. Ĝia organo estis nun Bulteno de I.S.A.E. Post la dua mondmilito restarigis kaj reorganizis la asocion d.ro Hanuš kaj la subskribinto, kaj de 1949 denove aperadas la Scienca Revuo, kaj la asocio

eldonas ankaŭ Bultenon por la membroj. Dum ĉi tiu periodo prezidis la asocion i. a. mondkonataj sciencistoj kiel prof. M. Fréchet (Franc.), prof. Seiho Nishi (Japanujo), prof. W. E. Collinson (Britujo), prof. Y. Väisälä (Finnlando).

Scienco estas laŭ sia naturo internacia, dependa de kunlaboro trans ĉiuj limoj. Sciencistoj, kies gepatra lingvo estas unu el la «grandaj» (angla, franca, germana, hispana, itala, rusa k. a.) ordinare publikigas siajn esplorrezultatojn en sia lingvo. Aliaj plejofte lernis, pli aŭ malpli bone, iun el tiuj lingvoj kaj pene verkas en ĝi. En la sciencistaj kongresoj kungrupiĝas ofte precipe tiuj, kiuj povas pli-malpli bone buŝe kompreni, kaj kontakto kun la ceteraj restas minimuma. Tamen ili kutime opinias, ke la lingvo, kiun ili «regas», sufiĉas, en Skandinavio plejparte la angla. Sed laŭ raporto de UNESKO nur 30 % de la monda sciencistaro pretendas regi la anglan, kaj konstatigas tendenco publikigi sciencajn rezultatojn en ĉiam pli multaj «grandaj» lingvoj.

Efektive estas malfacile konvinki

la sciencistojn pri la utilo de internacia lingvo. Preskaŭ neniu scienca revuo volas akcepti artikolon verkitan en Esperanto, sed iom pli facile oni akceptigas nacilingvan verkon kun resumo en Esperanto. La malfacilan taskon konvinki siajn kolegojn havas I.S.A.E. kaj la esperantistaj sciencistoj, kiuj hazarde «regas» iun difinitan nacian lingvon.

Scienco estas vastega kampo. Ĝi ampleksas ĉion de inĝeniera fako ĝis terkulturado, de teologio al filologio, juro, medicino kaj natursciencoj. Tio respeguliĝas ankaŭ en Scienca Revuo, kiu aperigas artikolojn, plejparte popularsciencajn, el ĉiuj branĉoj de sciencoj, kaj sekve prezentas tre varian legaĵon. Aliflanke I.S.A.E. organiziĝis en sekcioj, en kiuj pli bone kontaktiĝas membroj samfakaj. Ekzistas hodiaŭ jenaj sekcioj: arĥitekta-konstruista, astronomia, filologia, geologia, jurista, matematik-fizika, medicina, studenta kaj teknikista. En kelkaj landoj I.S.A.E. havas tiom da membroj, ke ili organiziĝis en landaj filioj.

La plej gravan laboron ankaŭ hodiaŭ faras la Terminologia Centro, kiu kunordigas la ellaboradon kaj eldonadon de fakaj terminaroj. Aliflanke la nuna prezidanto sukcesis starigi bonan kontakton kun internaciaj sciencistaj organizaĵoj, kio povos favore influvi vastajn rondojn de sciencistoj. Similan influon sendube havas ankaŭ la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, Belgujo, la ĝermo de vere internacia universitato utiliganta Esperanton, kun kiu I.S.A.E. kunlaboras.

Okaze de la 50-jara jubileo de I.S.A.E. en 1958 eldoniĝis jubilea libro,

«Sciencaj Studoj», kun 37 artikoloj pri originalaj sciencaj esplorrezultatoj el diversaj fakoj. La libro ankoraŭ estas havebla (kr. 19.00).

En Norvegujo I.S.A.E. havas nur dekduon da membroj. Sed la vorto «scienca» ne timigu vin, eĉ se vi ne estas profesia sciencisto! Ankaŭ amatoroj, kiuj interesiĝas pri sciencaj temoj, povas fariĝi membroj. La jara kotizo estas nur kr. 25,00, kaj por tiu sumo vi i.a. ricevas Scienca Revuon, 6 numerojn jare, kun la plej varia kaj interesa enhavo, kiun vi povas imagi. Landa Delegito (peranto) estas la subskribinto, al kiu oni povas sin turni.

C. Støp-Bowitz

China monata gazeto en Esperanto

### EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn de 1975

Abonprezoj:

1-jara £ 0.90 US \$ 2.20

2-jara £ 1.35 US \$ 3.30

3-jara £ 1.80 US \$ 4.40

Abonu ĉe la loka peranto:

ESPERANTOFORLAGET A/S  
Boks 942, Oslo 1  
poŝtĝirokonto 1.00.31

aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio  
de GUOZI SHUDIAN  
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)  
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Bonvole abonigu ankaŭ viajn  
amikojn. — Senpagaj specimenoj  
akireblaj laŭ peto.




# FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA  
ESPERANTISTA FERVOJISTA  
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Redaktoro: Odd Kolbrek



## FERVOJA ESTABLAJO EN MINIATURO ĈE LA LAGO ROKOSJØEN ĈE LØTEN, SITUANTA 17 KM DE HAMAR

El «Hamar Arbeiderblad» 26/11 1973

La estinteco, la estanteco kaj ankoraŭ pli la estonteco de la fervojo forte interesas stacidoman oficiston Per Johan Krogstie en Løten. Ekde lia infaneco la fervojo interesis lin. Ĉio kio rulis sur reloj kaj kio koncernas fervojon, estas lia ganda ŝatokupo. Dum multaj jaroj li kolektis fervojajn antikvaĵojn kaj kuriozaĵojn. Nun li aranĝis la kolektaĵojn ĉe sia kabano, kiu situas ĉe Rokosjøen, kaj venontsomere la kurioza kolekto estos kompleta, kiam Krogstie finos la konstruadon de miniatura fervojstacio ĉe la kabano. La reloj de la trako jam estas aranĝitaj. La trako estos etŝpura kaj devenas de torŝutaĵfabriko kiu estis en funkciado en Løten antaŭ multaj jaroj. «La trako estas ĉ. 50 m longa kaj menuj detaloj mankas ĉi tie,» rakontas Krogstie. La trako iros de la enirpordo de la kabano en la terenon kie ankaŭ konstruiĝos transtrakpasejo kun barierpordeto kaj signallanternino, kaj plue ĝi iros en vagonhalon kiu ankaŭ estos ekspozicidomo. «Ĉiuj objektoj kaj instalaĵoj estas propor-

ciaj unu al la aliaj,» diras Krogstie. Enŝlosita en granda ŝranko el vitro li havas unikan kolekton de malnovaj emblemoj devenantaj de diversaj fervojistuniformoj el tuta Eŭropo. Ĉi tie troviĝas ankaŭ bilettuigiloj de Hungario, Danio, Finnlando, Bulgario, Germanio, Nederlando, Svedio kaj Norvegio. Krome troviĝas signallanterninoj kaj kupelampoj ekde 1850 kaj de la sekvantaj jaroj, kaj de uniformĉapoj li havas grandan kolekton el 10 landoj. En alia ŝranko troviĝas ege malnova telegrafaparato por sendado de sciigoj kaj apud ĝi ekzemplero de unu el la unuaj telefonaparatoj, kaj Krogstie havas 15 albumojn plenajn de bildoj de stacidomoj el tuta Norvegio. Nun li ebenigas la terenon kie la fervojestablaĵo lokiĝos. Multaj kubaj metroj da ŝtono estas forminitaj kaj ĝin li volas apliki kiel ŝtonbarilon ĉirkaŭ la kabano. — «Ĉi tio estos speciala suverena ŝtato, disigita de la Reĝlando Norvegio kaj kiu ricevos internacian medion,» ridetante kaj serĉante diras Krogstie. Sed li aldon-

## Norvega Kroniko

### KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO

2/10. La prez. bonvenigis. C. Støp-Bowitz referis cirkuleron de N.E.L. pri kelkaj gravaj aferoj. John Berggreen prezentis interesan paroladon pri: «Lingva haoso aŭ Esperanto», en kiu li ankaŭ preparolis la signifon de Esperanto por la Skolta movado — i. a. li menciis ke ĝia prezidanto estas tre favora al Esperanto.

Inter la gastoj, kiuj ĉi tiun fojon vizitis la klubon, kaj kiujn prezentis Tamiko Kaŭakami-Nielsen, estis s-ro Steve Kane de Sydney, Aŭstralio. — Otto Prytz informis pri studrondo kiu okazos en la universitato en Blindern kaj kiu estos aranĝata de la Studenta Esperanto-Societo. — Vendiĝis libroj kun aparte bona rezultato, nome por 307,25 kr.

21/10. La prez. bonvenigis. Tamiko Kaŭakami Nielsen rakontis pri la vojaĝo kiun ŝi kaj ŝia edzo faris i. a. al Tahiti, Nov-Zelando kaj Aŭstralio. Ŝi montris multajn, belajn lumbildojn de la vojaĝo kiu daŭris 6 semajnojn, kaj poste aliajn bildojn de diversaj lokoj en ĉi tiuj landoj.

Vendiĝis libroj por 162,55 kr.

### MARA VENTO, Haugesund

14/9. La unua kunveno postferia okazis en la kutima ejo en KFUK. Malfermis la prez. bonvenigante la geanojn al nova labor-sezono. Sekvis memorigaj vortoj pri la fidela klubano Arne Gram, kiu subite mortis survoje al la UK en Hamburgo.



Per Johan Krogstie iom dubas:  
Ĉu por viroj, ĉu por virinoj?

as: «Ne ŝajnas al N.S.B. — Norvega Ŝtata Fervojo — ke estas laŭcele kaj defendeble konstrui flankenlinion de sia propra fervojreto ĉi tien.»

Per Johan Krogstie estas ano de Norsk Jernbaneklubb (Norvega Fervoja Klubo) kaj de A/L Hølandsbanen kies celo estas konservi fervojmemoraĵojn. — Konata dana parlamentano iam diris, ke tuj post la seksinklino la fervojinklino estas tiu, kiu vigligas la plej multajn pasiojn. Kaj mi volas kredi pri la vereco en ĉi tiuj vortoj, kiuj havis rezulton ankaŭ ĉi tie ĉe Rokosjøen.

\*

Persone mi volas aldoni ke Per Johan Krogstie, kiu ja estas fervora esperantisto, pere de la multaj kontaktoj kun esperantistaj kolegoj kiujn li havigis al si, sukcesis grandiĝi sian kolekton per emblemoj kaj objektoj el multaj diversaj landoj.

Rimarko de la red.



La programo temis pri la aŭtobusa kongresvojaĝo kiun aranĝis Mara Vento. Belan kaj interesan kolorfilmon prezentis kun komentarioj Ole J. Rønnevig, kaj la ĉeestantojn ĝuigis plaĉaj vojaĝ-fragmentoj el Danlando, Germanio (ĉefe la Rejna valo) kaj la kongreso. La programulo estis aplaŭde dankata. — La kunvenon ĉeestis preskaŭ 30 geanoj.

La oktobran kunvenon de Mara Vento vizitis proks. 25 geanoj kaj ilin kore bonvenigis la prez. — La ĉefa programero estis ĉi-foje kolorfilmo kiun prezentis la prez. Ĝi irigis la ĉeestantojn al la plaĉa Loire-valo en Francio tra kiu fluas la riverego samnoma kaj kie belaj kaj pompaj kasteloj troviĝas grandnombre.

Cetere oni aŭdis raporton pri la aŭtuna aranĝo sur la Haukeli-monto kie renkontiĝis duoncento da geesperantistoj en okcidenta, suda kaj orienta Norveglando. — Estis informate ankaŭ pri la norvega kongreso venontjare en Tromsø kiu sendube altiros interesatojn ankaŭ el la Okcidenta Distrikto.

oto

### Saŭda Esperantoklubb

kunvenis 7/10 ĉe gesinj. Matland. La prez. s-ro Norman Birkeli malfermis la kunvenon kaj bonvenigis speciale la du novajn membrojn Reidun Birkeli kaj Arnold Johannessen.

La sekretario O. Andersen legis la referatojn de la lastaj du kunvenoj. Poste li legis cirkuleron venintan de N.E.L. Ĝi kaŭzis nur mallongan di-

skuton. Lingva duonhoro sekvis gvidata de O. Andersen. Traduktaskoj, kiujn la membroj ekhavis por antaŭlaboro hejme, estis solvitaj diversmaniere. Ili kaŭzis viglan diskuton ĝis kiam oni trovis kaj samopiniis pri la plej bona teksto.

La sekretario rakontis pri la esperanta renkonto sur Haukeli monto ĉi aŭtune. Sino Elna Matland regalis per bonega kafo kaj manĝaĵo. Poste s-ro Johan Matland helpita de sia edzino rakontis pri vojaĝo kaj unusemajna restado en Parizo. Multaj belaj lumbildoj sekvis la rakonton. Elna Matland raportis pri la Internacia Esperanta Libroklubo

*Olav Andersen*

### NORSK ESPERANTO-FORBUND (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10030  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

#### *Turisma Servo:*

Boks 942, Oslo. Postgiro 10032

### ESPERANTOFORLAGET A/S (*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 10031  
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo  
Telefon: 69 14 39

#### *Ĉefdelegito de U.E.A.:*

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo 6. Postgiro 1 33 29

#### *La redakcio:*

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,  
6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

#### *Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*

Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal